



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ la mondo).

Numero 166

Februaro 2000

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Geoffrey Greatrex — preskontrolisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto

Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:

Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5

Abono por Kanado aŭ Usono estas \$8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas \$15



LINGVOJ KAJ HOMAJ RAJTOJ

[Rezolucio aprobita la 15-an de oktobro 1999 de la Tema Plenkunsido pri Homaj Rajtoj de la Internacia Konferenco Seulo de Ne-Registaraj Organizaĵoj]

La Tema Grupo pri Lingvo kaj Homaj Rajtoj de la Internacia Konferenco en Seulo en 1999 de Ne-Registaraj Organizaĵoj rekomendas;

1) ke la Ekonomia kaj Socia Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj (EKOSOK) metu en la tagordon de sia proksima kunsido la temon "Lingvo kaj Homaj Rajtoj", kun la celo diskuti problemojn de tutmonda lingva politiko kaj la neniigon de homaj rajtoj kaŭze de lingva malegaleco;

2) ke tia kunsido konsideru la nomumon de komisiono por esplori la eblecon kaj praktikecon de internacia helpa lingvo;


3) ke EKOSOK raportu al la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj pri la rezultoj de siaj malkovroj, kaj

4) ke tiu ĉi Seula Internacia Konferenco de NRO-j submetu la suprajn erojn kiel rekomendatajn proponojn al EKOSOK kaj al la Jarmila Forumo de NRO-j, antaŭvidata por 22-26 majo 2000, por iliaj atento kaj sekva agado.



Pri Kronologio

En numero 164 de Inter Ni diskutis la redaktoro diversajn opiniojn pri la nova jaro/jarmilo. Prave li atentigis ke la jaro 2000 ne estas la unua de nova jarmilo: ĉar ne estis jaro 0, evidente sekvas ke la jaro 2001 estos la unua de la tria jarmilo.



Plaĉus al mi atentigi legantojn pri kelkaj aliaj kronologiaj aferoj. Pluraj el ni, ŝajnas, interesiĝas pri tiaj aferoj. Steĉjo Norvell verkis lertan komputoran programon, per kiu oni povas kalkuli la tagon en la semajno de iu ajn dato en la historio (almenaŭ post Kristo): li eĉ sukcesis enkadrigi la diferencon inter la julia kalendaro kaj la gregoria. Kiel oni vidis en la antaŭlasta numero, Bob Williamson ankaŭ pripensis kronologiajn aferojn. Mi mem, kiel historiisto, ne povas eviti la neceson esplori pri datoj — ĉu ili estas pravaj, kredeblaj, kredindaj. Kaj tio alportas min al mia fina temo.

Kiun kronologian sistemon uzi? En la antikva mondo, ekzistis multaj. Iuj historiistoj, ekzemple, uzis la konstantan serion da olimpiaj ludoj kiel efikan tempo-mezurilon: oni povis datigi iun ajn eventon (post 776 a.K.) laŭ tiu olimpia sistemo. Aliaj uzis la nomojn de ĉefa magistrato (ekz. la atenanoj aŭ romianoj), aŭ elektis iun gravan daton por esti la unua de nova kalendaro (kiel faris iuj urboj post — ekzemple — la venko de la imperiestro Aŭgusto je Aktio en 31 a.K.). Nuntempe en tre multaj landoj oni uzas la kristanan sistemon. Tamen, iuj homoj, kvazaŭ por mildigi tian malferman anismon, deziras ne plu diri 'post Kristo', sed 'de la komuna erao' (aŭ eble 'de la kristana erao' — kiu almenaŭ estas honesta). Tian kompromison necesas nepre malaprobi. Se oni volas vere ŝanĝi la sistemon, oni elektu novan komenclaton (ekz. 1887!). Sed estas apenaŭ bona solvo daŭrigi la uzon de la kristana sistemo dum oni strebas pretendi ke ĝi estas neŭtrala: tia ĝi nepre ne estas — kvankam ĉu tio gravas estas dubinda, ĉar (plej grave) ĝi bone funkcias.

— Geoffrey Greatrex


PERSPEKTIVA PLANO KIEL KRESKIGI LA ESPERANTO-MOVADON ☺

Malkontentaj pri la kresko de la esperanto-movado, membroj de la biomedicina sekcio de ISAE prezentis lastsemajne perspektivan planon, kiel plirapidigi ĝin. Spronitaj de la sukcesaj eksperimentoj per ŝafinoj kaj musoj ili estas certaj, ke klonado de esperantistoj povus rapide fariĝi la plej sukcesa maniero kreskigi la esperanto-movadon.

La kriterioj, laŭ kiuj klonotaj esperantistoj kaj esperantistinoj estos elektitaj, ne baziĝos sur aspekto, sed sur lingvokapablo. Laŭ ankoraŭ ne pruvita teorio la lingvokonoj estas transdonitaj perklonado, tiel ke ne estos necese lerni la lingvon.

daŭrigata ⇒

Laborgrupo jam dum la UK en Montpeljero prenos kontakton kun taŭgaj kandidatoj.



Ĝi interesiĝas precipe pri radio-parolitoj kaj geaktoroj, konataj pro sia bona lingvo fluo. Sed ankaŭ familioj, kiuj uzas esperanton ĉiutage „prefere kun denaskaj infanoj” estas petataj veni al iu en la kunvenoj de ISAE por priparoli la projekton.

Se la eksperimento montriĝos sukcesa, tio estos la natura vojo esperantigi la mondon.



— Markus, la senrespondeca redaktoro de la satira ret-gazeto Male (ĉe <http://esperanto.nu/male/>)



ETAJ AĴOJ KIUJ GRAVAS

Antaŭ iom da tempo, laŭ la rakonto, viro punis sian 3-jaran filinon pro la malŝpara foruzo de rulo da luksa ora kovril-papero. Mono mankis, kaj li furioziĝis kiam la infano penis ornamo skatolon por meti sub la kristnaska arbo.

Tamen, la sekvantan matenon la knabineto alportis la donacon al sia patro kaj diris „Jen por vi, Paĉjo.” Li embarasiĝis pro sia plifrua troa reago, sed li denove koleris kiam li trovis la skatolon malplena. Li kriegis al ŝi „Ĉu vi ne scias, ke kiam vi donas al iu donacon, devus esti io interne?”

La knabineto rigardis supren al li kun larmoj en la okuloj kaj diris „Ho, Paĉjo, ĝi ne estas malplena. Mi blovis kisojn en la skatolon. Ĉiuj por vi, Paĉjo.”

La koro de la patro rompiĝis. Li brakumis sian filineton kaj petegis ŝian pardonon. Oni diras, ke la viro retenis tiun skatolon dum jaroj apud la lito kaj, kiam ajn li senkuraĝiĝis, li prenis imagan kison el la skatolo kaj memoris la amon de la infano kiu metis ĝin tie.

En tute vera senco, ĉiuj el ni jam ricevis ore kovritan skatolon plenan de la senkondiĉa amo kaj kisoj de niaj infanoj, amikoj, familio aŭ Dio. Neniu povus teni pli valoran posedaĵon.

— Anonima rakonto trovita en la kristnaska ret-poŝto

